# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisionde UEA

17-a jaro, n-ro 46(2023 :7)


*Karaj legantoj,*

*Vi certe rimarkis, ke ekde 2022 ne aperis nova bulteno de la revuo Esperanto en Afriko. Kulpas multaj teknikaj obstakloj, sed nun ni ĝojas informi vin, ke vi ree eklegos ĝin regule. La jaro 2022 kunportis multajn progresojn en la Afrika Esperanto-Movado : la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Thiès/Senegalo, telematikaj Esperanto-kursoj, naskiĝo de nova jure agnoskita junulara Sekcio (Senegala Esperanto-Junularo) de la Senegala Esperanto-Asocio... La jaro 2023 estas siavice ornamita per gravaj movadoj ĉe kies kerno estas la unuafoja* ***Universala Kongreso de Esperanto en Afriko****. La tuta afrika Esperantistaro estas tiom engaĝiĝinta kaj preta por gastigi tiun longe aspiratan eventon en Afriko. Tial la instruadoj multobliĝas en diversaj landoj sub diversaj aspektoj, tio estas instrui Esperanton per ĉiaj haveblaj rimedoj.*

**La redakcio**

## LA 8-a AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO EN SENEGALO



En Lando de la « Teranga », vorto signifanta « Gastamon » okazis la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en la urbo Tieso (Thiès). Lando kulture riĉa, plena je multegaj vidindaĵoj, kun popolo nature gastama kaj kie regas interreligia interkompreniĝo. Kun 55 partoprenintoj el Senegalo, DR. Kongo, Togolando, Madagaskaro, Burundo, Tanzanio, Britio, Usono, Germanio, Italio, Francio, Brazilo, Hispanio, Islando.

En la vespero de la 26a de decembro 2022 estis alveno de ĉiuj senegalaj samideanoj, ni ĝojis renkontiĝi kune en Tostan-centro la kongresejo. Regis ĝoja kakofonio, krokodiladoj, babiladoj, estis ja la interkona vespero.

La malferma ceremonio estis ĝojiga, varma, okazis diverslandaj tradiaj dancoj, poemoj, kantoj ; estis ege mojosa tago, iru ĉe: https://drive.google.com/file/d/1_rVuipOsq1ps1dkyCV-JxvhNwyTaNKh-/view?usp=share_link por spekti la filmeton de la 8-a AKE.



Dum la kongreso okazis multaj interesegaj prelegoj, programeroj, interŝanĝoj.
Menciindas kelkaj, kiuj ja helpos al la venontaj kongresoj en Afriko:

**Rakoen Maertens**: li prelegis pri mis-informado kaj dispolusigo de falsaj informoj. Li emfaze klarigis kiel falsaj informoj rapide disvastiĝas kaj estas tuj fidataj, akceptataj…, tiu prelego tute kongruis iasence kun tiu de sinjoro **Andreas Emmerich** el Germanio, kiu dum sia prelego asertis ke trafis lin falsaj informoj, ke en Afriko disregas murdoj, danĝeraj malsanoj, sed kion li en senegalo ne vidis. Li plurfoje planis veni en Afrikon sed nuligadis siajn vojaĝo-planojn pro tiuj falsaj informoj koncerne Afrikon, kiuj jam dispolusiĝis tra Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Oceanio. Li spertiĝis kaj nun, certe li havas tute malan idean koncepton pri afriko. Tio ĉi certigas, ke Afrikaj kongresoj okazas en pacaj landoj, kie ĉiuj kongresanoj povas plene kaj sekure ĝuadi sian restadon kaj sufiĉe spiri puran aeron.



**Espoir Ngoma Kasati**

# Preparkursoj en Senegalo



Estas afrikama Mireille Grosjean kiu elpensis la projekton, kiu konsistis el preparkursoj en Senegalo antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto. Oni serĉis unu instruiston kiu iros al Senegalo por instrui Esperanton antaŭ la kongreso, kandidatiĝis 30 homoj. La ĵurio estis tuj starigita, ĝi povis aŭdi ĉiujn kandidatojn kiel rege kaj mature ili regas la lingvon, kiom ili spertas pri la instruado. Post la unua prezentado, elektiĝis tri, sed la ĵurio devis kribri ĝis unu instruisto, tiu decido ŝajnis malfacila, tial finfine estis decidite preni du instruistojn, unu iru al senegalo ekde oktobro 2022 kaj la alia postsekvos kiel asista instruisto kaj kune surloke organizu intensajn kursojn. Mi feliĉas, ke mi estis la dua! Kaj la unua estis Vjatcheslav Ivanov el Sankta Peterburgo/Ruslando.



La kursoj estis ege sukcesaj. Kiam mi alvenis, mi trovis surloke la

lernantojn jam motivigitaj, la kursoj okazis en du malsamaj kluboj: unu en Rufisko kaj la alia en Dakaro, kio estis tre granda peno por Vjatcheslav Ivanov, sed brava, entuziasma kaj decida li estas, li ja sukcesis mastrumi la du klubojn.

La sekvan tagon mi iris al Dakaro por renkontiĝi kun tiea klubanaro kaj fizike renkontiĝi kun Vjatcheslav Ivanov, kiu estas vere nature afabla, bona homo, kunlaborema, havas belajn ideojn, antaŭenemajn iniciatojn por la Esperanto-kursoj mi ekĝuis la unuan tagon kun li. La unua tago estis tre mojosa, la varma gastigo estis akopanita de tradiciaj dancoj kaj la tradicia senegala plado: ***Tièp bou ginaar,*** ni kunfestis kaj kune pasigis agrablegan momenton.

**Espoir Ngoma Kasati**

# La kursoj



La kursoj bone progresis, okazis ekzercoj, diskutoj dumkursaj por paroligi la lernantojn, mi starigis demandetojn kiel: " ***kial vi trinkas teon ĉiumatene?***", tiaj frazoj kondukis al debatetoj, nu, mi devis prepari tagan lecionon ĉiutage estante surloke. La lernantoj ne estis akurataj, tio estis tre malfacila por ni ĉar en ĉiu kurso ĉeestis lernanto(j), kiuj ne ĉeestis pasintan lecionon, tial el iliaj dirâĵoj dum la debatoj fontis tagaj lecionoj. Iun tagon, ĉeestis gesamideanoj venintaj al Senegalo por partopreni la kongreson el ***Kanariaj Insuloj/Hispanujo***, temas pri **Petra Severiano kaj Echedey Jorge.** Ili ĉeestis miajn kursojn en Dakaro du fojojn kaj unufoje en Rufisko. En ĉiuj kluboj ĉiutage okazis kursoj, en Dakaro kaj En Rufisko. Mi ĝojis, ke inter mi kaj Vjatcheslav Ivanov regis frateca kunlaboro, ni respektis unu la alian kaj plej grave estas, ke ĉiu el ni ambaŭ admiris la kapablon de la alia: mi imagis, ke s-ro Ivanov ne antaŭpensis ke povas renkonti junulon malpli ol 30jaran kiu flue kaj rege parolas Esperanton, li ĉiam volis paroli kun mi, same mi ŝategis ĉiun fojon kiam ni renkontiĝi, ĉar li ja primajstras la instruan karieron. Estis tia harmonio eĉ flanke de niaj lernantoj, ili ja amis nin.



Antaŭ ol foriri al la kongresejo **Petra Severiano kaj Echedey Jorge** organizis festeton tiam post kurso, estis ja agrabla tago, ni kuntostis je nia renkontiĝo kaj konatiĝo.

La preparkursoj estis sukcesaj kaj avantaĝoplenaj. La kongreso estis tre interesa ankaŭ danke al la ĉeestoj de niaj lernantoj, kiuj nun parolas esperante, tiun sukceson ni ŝuldas al *Mireille Grosjean, Jeremie*

# La antaŭlasta tago



La antaŭlasta tago estis markita per du ĉefaj programeroj : Ekskursoj kaj Ekzamenoj.

Danke al la preparkursoj, ekzameniĝis 21 lernantoj, la plejmulto atingis la nivelon inter A2 kaj B1 aliaj atingis eĉ B2. La ekzamenajn aktivecojn plenumis S-roj **Vjatcheslav Ivanov kaj Espoir Ngoma Kasati** akompanate de tre afabla sinjorino **Martina Sachs**.



En la domo de sklavoj sur Goreo insulo

La ekskursoj estis ege sukcesaj, unuparte ĝojiga kaj aliparte melankolia: la vizito ĉe roza lago estis plena je belaj ridetoj, sed la vizito sur insulo Goreo, kie estas la sklav-domo, estis tre morniga. Pro la praaj historioj koncerne la koloniajn fiagojn, multaj estis profunde kortuŝitaj, aliaj eĉ ploris... La sklava vivo en ege etaj ĉambraĉoj, kondiĉoj kiujn travivis niaj prauloj nigruloj, ne permesis fari longan prian artikolon, ĉar ruĝaj larmoj elfluantaj el la okuloj de la ekskursintoj, fermis ties buŝojn rankonti multe ....

Pretaj por iri al ekskursoj



Borde de roza lago





Virinoj kunsidis dum la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Senegalo, etosoplena estis la kunsido kun interesaj virinaj programeroj !




Komuna foto en la centro Tostan, estis post la malferma ceremonio.

Estis agrablege kongreso kun interesaj programeroj !!!

## ZAMENHOFA FESTO EN ANTANANARIVO

Esperantistoj el Antananarivo sukcese organizis la festan renkontiĝon en Itaosy sabate la 17-an de Decembro 2022.



Dudek geesperantistoj partoprenis el Itaosy klubo, Anosibe klubo kaj Manjakaray klubo. ĉiuj kunĝojis dum tiu mojosa kaj paca etoso. Prezentadon, kantadon, legadon, diskutadon pri la movado, manĝadon ni faris.
Partoprenintoj deziris sukcesan vojaĝon al Ranja kaj Miora por partopreni 8-a AK en Senegalo.

**Miora RAVELOHARISON**
le.myrhe@gmail.com

***Ni dankas Henriel kaj Sylviane gastigi tiun eventon***

# INTERNACIA TAGO DE VIRINOJ MARTE 2023

Multaj eventoj kaj manifestacioj okazis de movadoj kaj asocioj tra la mondo por celebri la venkon kaj atingojn rilate virinajn rajtojn.
Niaj Esperantistaj Virinoj en Afriko en siaj hejmlandoj ankaŭ celebris tiun tagon, en Esperanto-Asocio kaj en aliaj virinaj organizaĵoj.
La afrika esperantista virina asocio organizis virtualan renkontiĝon samtage vespere celebre al tiu tago. Ni interŝanĝis pri la ĉi-subaj temoj :

- Virino devas lerni novajn teknologiojn por batali kontraŭ la analfabeteco,
- Edukado de knabinoj
- Povigo de virinoj.
- EVAA projektoj

**Mojosa kaj amikeca estis tiu etoso kun 21 geesperantistoj el diversaj landoj.**

## ….en DR Kongo

La EVA DRK grupo organizis konferencon sub la temo « virinoj devas lerni novajn teknologiojn por batali kontraŭ analfabeteco. Ĝi okazis en Kinŝaso. Alexandrine Omba kaj sia teamo sukcesis.

## …kaj en Madagaskaro

Ekskurso, diskutado pri nia lernado kaj movado, okazis en la ĝardeno Antaninarenina en la urbocentro. 15 esperantistinoj ĉeestis. Ni estis feliĉaj dum tiu amikeca renkontiĝo.

***Virino havas grandan rolon en tiu mondo.***






***Vivu Esperanto kaj Vivu virinoj !***
***Miora RAVELOHARISON***

# NEKROLOGIO DE NIA AMIKINO LALA !

RALALARISOA Justine --- de ni ĉiuj konata kiel Lala aŭ Lala Justine --- forpasis la 20an de majo 2024 kaj estis enterigita en sia gepatra vilaĝo en Belazao en Antsirabe, je 176 km sude de Antananarivo. Pastorino Miora, Sylviane kaj Mihary akompanis min kun du koleginoj de la ENS por prezenti al la familio niajn kondolencojn la posttagmezon de la 21a de majo. La postan tagon tre frue, la familio veturigis nian amikinon al ŝia lasta ripozejo en Antsirabe. Mi ekkonis Lala kiam ni studis en la pedagogia sekcio (nomata france Ecole Normale Supérieure (ENS)) de la universitato de Antananarivo en Ampefiloha en 1990 kaj ni renkontiĝis tie ĉiutage ĝis la fino de niaj studadoj en 1995.

Por ni ĉiuj en la sama promocio, Lala estis ne nur kolegino, ŝi estis nia plej ŝatata pliaĝulino, kiu ne mistrafis konsili, konsoli, dorloti kaj eĉ grumbli nin kiam iu el ni miskondutis. Ŝia Edzo Benja kaj ŝi ofte invitis nin en sia domo por trinki rumon, kiun ŝi kunportis de Ambilobe en la nordo de la lando. La geedzoj donacis al ĉiu el la samklasanoj de la unua stud-jaro pri la franca lingvo unu kartonon da beletraj libroj.



Tiam, Lala kaj mi estis bonegaj geamikoj. Kaj kiam mi edziĝis en 1992, mi prezentis mian Edzinon Sylviane al ŝi, kio igis ŝin parto de nia familio. En la kvina jaro de nia studado, ni elektis la saman profesorinon por gvidi nian respektivan verk-laboraĵon. Post sia diplomiĝo, ŝi

tuj enposteniĝis kiel instruistino pri la franca lingvo en la Liceo Andohalo, en la supra parto de Antananarivo ĉar ŝi estis jam ŝtat-oficistino.

Dume, mi devis batali kun aliaj samsortanoj por fariĝi ŝtat-funkciulo antaŭ ol esti sendita al iu fora regiono. Tuj post la fino de nia studo en ENS, mi instigis ŝin lerni Esperanton. Sed ŝi estis skeptika tamen, por « kontentigi min », ŝi sekvis miajn unuajn lecionojn siahejme. Ekfariĝinte ŝtat-oficisto, mi devis forlasi la ĉefurbon, sed Lala mi konfidis al mia amiko Raveloson Eugène ĉe kies domo ŝi daŭrigis la lernadon en ĉiu dimanĉo kun aliaj gejunuloj. Kaj la Esperanta aventuro komenciĝis por Lala en 1997 kiam ŝi forflugis al Eŭropo por la unua fojo de sia vivo. De tiam, ŝi pasis la someran ferion tie kaj profitis la okazon por renkonti multajn geesperantistojn tra kelkaj Eŭropaj landoj. Ĉiuj geamikoj de Lala konstatis, ke ŝi estis ege aktiva virino. Krom la diligenta instru-laboro pri la franca, ŝi provizis ankaŭ kursojn pri fiziko kaj matematiko (ŝi ja specialiĝis pri tiuj fak-temoj), al gejunuloj al kiuj ŝi donis de tempo al tempo Esperanto-kurson. Krome, ŝi estis fervora praktikanto de karateo, nacia arbitracianto pri tiu sporto kaj dum kelkaj jaroj, membro de la loka federacio pri karateo. Ŝi estis nigra zono kun duagrada ŝtupo pri karateo kaj ŝi instruis karateon al geinfanoj en sia klubo en Behoririka.



Intertempe, ŝi estis elektita kiel prezidantino de nia nacia Asocio UME kaj pli poste enposteniĝis kiel sekretariino de nia Asocio. Ŝi starigis la Tanan Esperanto-Klubon (TEK), kiu estas la unua Esperanto-klubo en la kvartalo de Manjakaray. Lala estis komitatano B en UEA kaj havis ankaŭ rolon en la Afrika Komisiono de UEA. Ŝi reprezentis ankaŭ Esperanto-Turismon en nia lando. Cetere, ŝi estis membro de SAT (matrikulo 35513), kies perantino en Malagasio ŝi estis. Lala senlace vizitis klubojn kaj esperantistojn en Soavinandriana Itasy, Mahabo, Moramanga ktp. Ni kune organizis la nacian kongreson de Esperanto en diversaj lokoj de la lando. Aliflanke, dum diversaj sesioj de la Internacia Ekzameno de UEA/ILEI, Lala estis oficiala ekzamenantino.

Lastan aŭguston, mia klubo Itaosy Esperanto-Klubo (IEK) organizis atestigan lingvo-ekzamenon kaj Lala kaj mi estis la geekzamenantoj. Ŝi ĉiam montris profesian sintenon, rigorecon kaj seriozecon pri kio certe rememoros niaj gekandidatoj. Aliflanke, ŝi kunaŭtoris kun mi gvidlibron en la malagasa pri Esperanto kaj ŝi devus korekti la vortaron Esperanto-malagasy verkatan de mi sed bedaŭrinde, la morto forportis ŝin. Du monatojn antaŭ sia foriro, Lala telefonis al mi pri sia intesta kancero. Mi estis tute senpova, senvoĉa kaj malkuraĝigita. Sed ŝi tuj admonis min ne perdi kuraĝon ĉar ŝi asertis ke, iam, ni ĉiuj devas morti. Ridetema virino, Lala estis alirebla al ĉiuj homoj. Dum iu paŭzo, ŝi bonvoleme diskutis kun vi suĉante sian cigaredon. Tre afabla kaj bonkorulino, Lala ne mistrafis la okazon kunporti de Eŭropo librojn kaj materialojn por helpi la malriĉajn infanojn de sia kvartalo en Manjakaray.

Ni perdis karegan amikinon, mankos al ni diligenta kolegino sed ŝi daŭre flustras ĉe niaj oreloj la refrenon pri amikeco kaj solidareco. Vivu Esperanto !

***Henriel FIDILALAO***

## DR. KONGO: ESPERANTO KAJ UNESKO

Dum iu lasta E-Renkontiĝo, inter la rezolucioj, La kunvenintoj rekomendis la kunlaboradon inter la landa Asocio kaj UNESKO por la taŭga disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto. Tiu rekomendo fingrumis la pintan organizaĵon de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Scienco, Kultuto kaj Eduko. Tra tiuj kampoj la lingvo Esperanto gravas por la disvolviĝo de la homaro celita de UNESKO. Kadre de tio, la eks-vicprezidanto de UEA, s-ro Trezoro Huang Yinbao kontaktiĝis kun du honoraj prezidantoj de DKEA por voĉ(don) igi la peton de UEA ĉe UNESKO dum la Ĝenerala Asembleo/Kunsido. Tial, Emile Malanda kaj Jean-Pierre Lungikisa estis mandatitaj al la Nacia Komisiono por UNESKO en DR Kongo. La tasko estis bone transprenita.

La sperto de DR Kongo estas unu fakto en la aplikado de la menciita rekomendo. La 14-an de aprilo 2023 la Esperantistaro en Kinŝaso leviĝis en la ritmo de Unesko por organizi la Kulturan Tagon de Esperanto sub la titolo : "Esperanto kaj Unesko". La programo estis bunta kaj alloga. La ĉeestintoj konsistis el la Esperantistoj, unuflanke kaj la oficistoj de la Nacia Komisiono por UNESKO en DR Kongo, aliflanke. Por la Esperantistoj estis granda evento neniam okazinta en nia lando. Por la oficistoj de la Nacia Komisiono por UNESKO temas pri iu nova kaj stranga afero pri kiu ili ne vere aŭdis dum Esperanto estas unu el agnoskitaj komunikiloj de UNESKO.



Du belsonaj paroladoj  markis la Kulturan Tagon de Esperanto organizitan en la ĉefurbo Kinŝaso. La unua prezentita de la Direktorino pri la Partnereco kaj Kooperacio de la Nacia

Komisiono por UNSEKO en DR Kongo. Aprezinte la iniciaton, ŝi memorigis ke inter la Konga Movado kaj sia instanco ekis kunlaboro de pluraj jaroj kaj havas bonajn rilatojn. Ekde 2012, la Landa Esperanto-Asocio estis inter la aliĝintaj asocioj de UNESKO en DR Kongo. Do, ne estas dubo pri la kunlaboro, aldonis ŝi. Ŝi invitis la Kongan Esperantistaron multobligi la iniciatojn por bone disvastigi la Internacian Lingvon Esperanto tra la lando. Nome de la Konstanta Sekretario kiu gvidas la Nacian Komisionon por UNESKO en DR Kongo, ŝi promesis la akompanan subtenon en diversaj projektoj kadre de la Esperanto-instruado kaj invitis la Kongan Esperantujon organizi rapide la Esperanto-instruadon en la aliĝintaj element-mezlernejoj al UNESKO tra la lando. La ceremonio estis deklarita malferma de ĝi.
Venis alia allogega momento de la programo, tiu de la parolado de la grava invitito al la evento, nome D-ro Isaias Barreto da Rosa, la alta funkciulo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Reprezentanto de UNESKO en DR Kongo. Li akceptis nian inviton kaj prezentiĝis. Dum la parolado li emfaze notigis ke Esperanto estas grava por UNESKO kaj ĉi-lasta



chiam atentas pri la Esperanto-agadoj en la mondo. Li entuziasmigis la partoprenintojn substrekinte ke Esperanto tra UEA kontribuas en la idealoj kaj valoroj de UNESKO per la konkretaj realizaĵoj. Li diris en klaraj vortoj ke Esperanto estas vera internacia lingvo kaj invitis la popolon ne heziti lerni ĝin. Li elvokis kelkajn agadojn de UEA en la serĉo de la Paco kaj kelkajn esplorojn realigendajn en la sociaj kampoj.
Li fine gratulis la organizan teamon pro la iniciato, kiun li neniam imagis okazi en DR Kongo. Kaj li emfazis ke tia iniciato ne estu la lasta. Li promesis ke UNESKO ĉiam akompanos la Kongan Esperantujon.
La programo havis du prelegojn. La unua estis prezentita de Heidi Goes el Belgio, kiu fakte troviĝis en DR Kongo kadre de ŝia esplorlaboro. Dum la prelego ŝi parolis pri diversaj spertoj en sia Esperanto-vivo. Ŝi elmontris la vojon sekvitan de ŝi esperantuje, de la esperantiĝo ĝis nun : de kiu kaj de kiam ŝi lernis Esperanton, kion ŝi realigis de la esperantiĝo ĝis nun … La prezentaĵo estis interesa ĉar la ĉeestintoj lernis ke Esperanto estas praktika lingvo en ĉiu socia tavolo. La dua kaj ĉefa prelego de la Tago estis prezentita de s-ro Emile Malanda, Konga Esperantisto kaj iniciantinto de la evento. La temo estis : ESPERANTO KAJ UNESKO. Li prelegis pri ĉiuj aspektoj, kun fontoj, kiuj markis la oficialajn rilatojn inter UEA kaj UNESKO, de la agnosko pri Esperanto de UNESKO ĝis nun! La preleganto detalis pri la diversaj Rezolucioj favore al Esperanto dum la Asembleoj kaj Kunsidoj de UNESKO, kun precizaj datoj kaj lokoj; pri la diversaj realigitaĵoj kaj realigendaĵoj de UEA kiuj kongruas kun la kampoj de UNESKO; pri la kontanta laborplano de

UEA pri la idealoj kaj valoroj de UNESKO … Okaze de la Kultura Tago, li resumis la historion de la Landa Esperanto-Asocio, DKEA, kiu ekzistas ekde 1966 kaj aliĝis al UEA en 1973.

Laŭprograme de la Kultura Tago de Esperanto, la komitato de DKEA prezentis la bonvenigan vorton al la invititoj je la komenco kaj la dankvorton ĉe la fino al la ĉeestintoj ĝenerale kaj la aŭtoritatoj de UNESKO, aparte. La Junularo plibeligis la tagprogramon per la kanto de la Esperanta Himno, post la nacia himno kantita de ĉiuj; ankaŭ per la deklamo de la bela poemo pri AMO. Ankaŭ kantis esperante Abel Massiala, partnero de Heidi Goes. Post du prelegoj estis la debato dum kiu la prelegantoj respondis kontentige al ĉiuj demandoj. Komuna fotiĝo kaj refreŝigo sekvis; post la tago finiĝis per ekspozicio de la esperantaĵoj. Kontribuis al la evento ankaŭ la ILEI-Sekcio en DR Kongo.

***KOMUNAJ REKOMENDOJ DE LA PARTOPRENINTOJ***

1. ***TREJNADO DE INSTRUISTOJ***
2. ***ESPERANTIGO DE OFICISTOJ DE LA NACIA KOMISIONO POR UNESKO***
3. ***INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ ALIG'INTAJ AL UNESKO EN DR KONGO***
4. ***OKAZIGO DE JARA FESTIVALO DE ESPERANTO EN DR KONGO (unua festivalo 2024 en Kinshasa)***

**Emile Malanda**

## Orienta Afrika Seminario de Esperanto en Burundo

Okazis Orienta Afrika seminario kie partoprenis Burundaj, Kongaj kaj Tanzaniaj geesperantistoj kungviditaj de Prof. Dr Francesco Maurelli por du tagoj de merkredo la 14 ĝis ĵaŭdo la 15a junio 2023.
La temo de la seminario estis : PREPARO DE LA 109-A UK 2024 en Arusha/Tanzanio
Post la seminario, la partoprenantoj havis tempon por pridiskuti la defiojn kiuj povas aperi en la UK kaj ili proponis solvojn.
Dankon al

1. Prof Dr Francesco Maurellie kiu gvidis la seminarion
2. Partoprenintoj (Burundanoj ,Tanzanianoj kaj Kongolandaj
3. Landa Asocio de Esperanto en Burundo kiu gastigis la seminarion.






*Manirakiza Aimé-Patrick*

## LA INTERNACIA TAGO DE ESPERANTO CELEBRITA EN DR. KONGO

Okaze de la internacia tago de Esperanto, ni havas la privilegion ellabori ĉi tiun raporton pri la aktivadoj faritaj en Kinŝaso.
Principe ĉi tiu tago estas festata la 26-an de Julio en ĉiuj nacioj kie la lingvo Esperanto estas parolata.
Ĉi-jare estis la 136-a datreveno de Esperanto. En tiu ĉi festa tago je internacia skalo estis festita de Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio(DKEA) sub gvido de sinjoro GUY ROGER ILEKA lIONDJO, dua vicprezidanto de DKEA ĵaŭde la 27-an de Julio 2023.
La scenaro elektita por tiu ĉi bunda evento, estis en kasavubu sur strato enseignement .

Kvin punktoj estas traktitaj en la tagordo :

Malfermis la eventon s-ro PAUL MAZANGU DIUMBEKI bonvenigante ĉiujn partoprenantojn kaj donis la parolon al la dua vicprezidanto de DKEA s-ro GUY ROGER paroli pri la cirkonstancoj. Parolante, s-ro la vicprezidanto invitis la partoprenantojn alproprigi esperanton kiu estas neŭtrala facile lernebla.
Poste, la parolo estis donita Al sro Jean-Pierre LUNGIKISA kiu prelegis pri dirita tago kaj sekve s-ro MAVOMO MAFUILA klarigis pri la historio de la lingvo Esperanto. La legado de la letero de UEA al la esperantistoj okaze de la inernacia tago de Esperanto festata la 26-an de julio fare de Sro Remond Mata.

Fine, la Representanto de la nacia sekretariejo por UNESCO, prezentis al la partoprenantoj dokumenton konfirmantan la privilegian partenerecon inter DKEA kaj UNESCO.
La ceremonio komenciĝis je la 14a kaj finiĝis je la 16a.
Notindas ke la evento estos elsendota de la nacia kanalo(RTNC3) lunde je la 17a

***S-ro Remond Mata.***

## NOVAĴOJ DE LA ESPERANTA RETA RADIO

Celita Publiko: Homoj en Afriko kaj en la mondo interesitaj pri lerni kaj antaŭenigi la uzadon de Esperanto kiel dua lingvo. Novaj kaj malnovaj kluboj. Landaj Asocioj. Ni ne forgesindas

ke la projekto estas subtenita de individuoj, Esperanto-kluboj kaj Asocioj tra la mondo sub la kontrolo de la  Afrika Komisiono de UEA kaj UEA mem.

Ĉefa mesaĝo :

- Esperanto estas facila lingvo por lerni kaj uzi,
- Paroli Esperanton antaŭenigas kulturan interŝanĝon inter nacioj,
- Nia retradio donas la ŝancon lerni, praktiki kaj konektiĝi kun aliaj Esperanto-parolantoj en Afriko kaj en la mondo.

Ĉio estos farata respektante la ĉefajn regularojn de UEA, pri politikaj, raciaj, seksaj, neŭtraleco.
**Slogano** : « La voĉo de Afriko » « Afriko en la verda stelo »

Mediaj Kanaloj:

1. Sociaj Amaskomunikiloj : ni uzos sociajn amaskomunikilarajn platformojn kiel Facebook, Twitter, Instagram kaj LinkedIn por reklami la retradion al nia celgrupo. Ni povas krei allogan enhavon kiel videojn, blogajn afiŝojn kaj grafikaĵojn kiuj elstarigas la avantaĝojn de lernado kaj uzado de Esperanto.
2. Retpoŝta Merkatado : Komencu retpoŝtan merkatan kampanjon por sendi bultenojn kaj ĝisdatigojn pri novaj epizodoj aŭ eventoj rilataj al la retradio. Ni ankaŭ povas oferti senpagajn lingvo-lernajn rimedojn al niaj abonantoj. Tiu aspekto estas Perspektivo.
3. Google Ads: ni uzos Google Ads por atingi homojn kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj lingvo-lernado. Ni povas enmeti ŝlosilvortojn kiel « Esperanto » « lerni Esperanton » kaj « lingva interŝanĝo » por maksimumigi la videblecon de nia retradio.

**Kromaj agadoj:**

1. Gastaj intervjuoj aŭ prelegoj: Ni povas inviti gasto-parolantojn aŭ Esperanto-entuziasmulojn por kunhavigi siajn spertojn kaj komprenojn pri la Esperanto-movado en Afriko kaj la mondo. Tio povas helpi konstrui senton de komunumo kaj inspiri aŭskultantojn daŭrigi lerni kaj reklami Esperanton.

2. Labor-renkontiĝoj pri lingvo-lernado: Ni povas organizi virtualajn aŭ fizikajn labor-renkontiĝojn por instrui Esperanton al komencantoj aŭ mezjernejaj lernantoj. Ĉi tio povas esti bonega ŝanco por aŭskultantoj ekzerci siajn kapablojn kaj retumi kun samideanoj Esperanto-parolantoj.

3. **Virina agado kaj virinaj rajtoj :**

Ni ofte okazigos prelegojn kaj vivajn elsendojn invitante  esperantistinojn por debati pri la virinaj agad-kondiĉoj en la movado. Kaj interŝanĝi pri la malfacilaĵoj, kiujn ili spertas en la movada kampo. Ĝenerale, nia kampanjo koncentriĝos pri reklamado de Esperanto kiel alirebla kaj utila lingvo por homoj en Afriko. Provizante senpagan retradian platformon por lingvo-

lernado kaj kultura interŝanĝo, ni celas krei pli inkluzivan kaj interkonektitan mondon.

**Verkita de Koffitche KOUFIONOU**
**Sekretario de AK,**
**koffitch1990@gmail.com**
**11BP59LOME**
**+22898989138**
**ATTIEGOU-OANDO**
**TOGO**

## *FESTO SEN KESTO... (DA BIERO)!*




Sincerajn dankojn al pastorino Miora, Ranja, Mihary kaj Tatiana, kiuj alkuniĝis kun mi por ĉeesti tiun eksterordinaran renkontiĝon en ĝardeno de Antaninarenina hodiaŭ posttagmeze. Ni tion faras por festi (sed festo sen kesto...(da biero)!) la 136an datrevenon de nia lingvo Esperanto. Krom tio, Pastorino Miora kaj Ranja klarigis al ni siajn respektivajn projektojn por revivigi Esperanton nialande. Vi ĉiuj estos informitaj pri tio ĉio en taŭga momento, tamen tre mirigis min iu el la diroj de Pastorino, ŝi ja preparas tutmondan, gigantan kaj ambician projekton pri la Sankta Biblio. Sed kompreneble, ne ŝi sola ĉion faros, ŝi bezonos ankaŭ vin. Feliĉan Esperanto-Tagon al ni ĉiuj!

***Henriel Fidilalao***

## LA INSTRUADO DE ESPERANTO FLORAS

Nenio pli gravas por la esperantistoj kiom nun tiom iam ajn venonte ol la disvastigado de la uzado de la lingvo internacia Esperanto.

Kvankam la retaj kursoj ne anstataŭas la ĉeestan etoson en kiu disvastiĝas Esperanto en la tradicia fizika instruado, tamen aliflanke la interreto nun ekdonas la alternativan eblon esperantiĝi eĉ per sia saĝtelefono ie ajn, kie la interreto estas alirebla. Diversloke afrikaj esperantistaj isntruistoj

aktiviĝas instruante Esperanton per WhatsApp, Telegram kaj Zoom. La uzado de la du antaŭaj platformoj en distanca instruado ŝajnas stranga, jes, verŝajne, sed en Afriko estas dezirinde uzi tiujn platformojn pro ties malmultekosteco kaj ne-ĉeestopostuleco kaj pli grave, homoj uzas ilin por ĉiutaga komunikado, do ne sentas la devon elŝuti la apon nur por la lernado de Esperanto.

Krome, tiuj du platformoj iĝis tujaj uzindiloj responde al la nuna celo de la Afrika komisiono de UEA partoprenigi mil afrikajn esperantistojn en la venontjara Universala kongreso en Tanzanio 2024, por atingi tiun nombron necesas verva laboro, tial tuj eksciinte la defiojn, kiuj atendas ilin, la Afrikaj Esperantistaj instruistoj ekelpensis novan manieron dispolusigi la instruadojn de Esperanto tra Afriko, kaj tiel, uzante diversajn ilarojn por atingi tiun celon. Notindas, ke tiu nova praktiko ne nur uzatas en la ĉirkaŭaj regionoj de tanzanio, sed ankaŭ en la foraj por ebligi regulan virtualajn lernadojn.

***Espoir Ngoma Kasati***

## *Ernesto Patrício Tomé, nova pioniro de Esperanto en Mozambiko*



Estis longe aspirata la deziro ligi ĉiujn afrikajn landojn esperanto-movade, sed pli kaj pli malfacilis atingi kelkajn landojn precipe la portugallingavajn. Iam ekĝermis movado pere de iu esperantista grupeto, estis espero ke perde de ĝi aliaj landoj estus atingitaj, sed bedaŭrinde ĝi malvigliĝis! Sed post fervora kunlaboro inter la instruistoj nome S-ro rena Corsetti, Fransuazo Oazo kaj Espoir Ngoma Kasati, finfine eblas ekesperi ke en Mozambiko baldaŭ naskiĝos nova esperantistaro kiu frukto esperantuje. La viro varbita ne tiel bone scipovas la francan nek la anglan lingvon, mi [Espoir Ngoma Kasati] estis devigita, por korespondi kun tiu homo, skribi mesaĝojn esperante kaj tradukigi ilin per Google tradukiloen la portugalan kajposte sendi la tradukitan, same kiam ricevis la respondon, devis denove fari la samon por kompreni kion li respondis. Finfine a mozambikano konsentis lerni, tuj serĉis instruiston, kiu povas Esperanton instrui per la portugala, nun jam registriĝis kelkaj por la kurso de Esperanto en per la portugala komenciĝonta la 2an de aŭgusto 2023.

**Espoir Ngoma kasati**

*Esperanto en Afriko* iĝis dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Espoir Ngoma Kasati, B.P. 1023, Lubumbashi, DR. Kongo; tel.: +243 972 716 042

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *espoirkasati@gmail.com*.

**Limdato por la 47-a n-ro:** la 31-a de Oktobro 2023

**Membroj de la Afrika Komisono (2022-2025) :**

S-ro Aimé-patrick MANIRAKIZA, **Burundo**

S-ro Koffitche Koufionou, **Togolando**

S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**

S-ino Ranja Robertine jean d'Arc Zafinitotsy, **Madagaskaro**

S-ro John E. Magessa, **Tanzanio**

S-ro Espoir Ngoma Kasati, **DR Kongo**